# Informilo

Monata revuo - Maandelijks tijdschrift - 11a j. n-ro 1, jan. 1991

## Estraro

*Prezidanto:* vakas.

*Sekretario:* Ivo Durwael, Paul Gilsonlaan 5, 2650 Edegem. Tlf. (03) 440 30 92.

*Financoj:* Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge. Tlf. (050) 33 00 04.

*Instruado:* Alex Humet, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem. Tlf. (03) 239 21 69.

*Eksteraj rilatoj:* Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3530 Houthalen. Tlf. (011) 52 19 43.

## Komisiitoj

*Financoj:* Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.

*Eldona agado:* Chris Declerck, Gerrit Berveling, Rejna de Jong, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.

*Manlibro de la aktivulo:* Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3001 Heverlee. Tlf. (016) 20 14 53.

*Gazetara servo:* Guido van Damme, p/a FEL, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen. Tlf. (03) 234 34 00.

*Rebata servo:* Germain Pirlot, Steenbakkersstraat 21, 8400 Oostende. Tlf. (059) 70 87 00.

*Prelegvojaĝoj:* Hilde van Ingelgem, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst. Tlf. (053) 70 50 11.

# FEL-estraro: protokolo

12a de januaro 1991

## 1 Financoj

**Ĉeestas:** Ivo Durwael, Roland Rotsaert, Paul Peeraerts.

### 1.1 Spezokonto

La ciferoj de 1991 ne jam estas pretaj.

### 1.2 Monato

Precizaj ciferoj pri la evoluo en 1990 ne jam estas konataj sed estas klare ke la abonantaro altiĝis.

### 1.3 Lingvoborso Bruselo

FEL decidis subvencii la Esperanto-standon en la lingvoborso de Bruselo per la sama sumo kiel pasintjare, kondiĉe ke deĵoru en la stando konstante almenaŭ unu persono kiu regas la nederlandan lingvon.

### 1.4 Libroservo

La estraro komisias al la centro produkti libroliston en kiu aperas ĉiuj ĉe FEL riceveblaj varoj (do ne nur la propraj eldonaĵoj).

### 1.5 Lifto

RR kopios artikolon pri tiu temo kiu aperis en *Test Aankoop* kaj kunportos ĝin venontkunside.





### 1.6 Asekuroj

Asocioj kiuj organizas kunvenojn k.s. ekde nun devas asekuri sin kontraŭ la ĵargone nomata "civila respondeco". Ni ne jam ricevis de Jan Bovendeerd la petitajn konsilojn ĉi-rilate.

## 2 Administra parto

**Ĉeestas:** La samaj tri plus Alex Humet kaj Jos Vandebergh.

### 2.1 Antaŭa protokolo

Pri punkto 2.3. JV rimarkigas, ke la decido pri *Horizontaal* estis farita eksterkunside.

Pri punkto 2.9. Espeurop. Prefere oni fortranĉu la telefonnumeron de la glumarkoj de Espeurop, ĉar ne deĵoras tie iu kiu regas la nederlandan nek Esperanton.

### 2.2 Urd Hadda

La estraro decidas eldoni la libron *Urd Hadda murdita!* atentante la lingvajn rimarkojn de Rejna de Jong (kun escepto de du-tri evidentaj misoj).

### 2.3 Horizontaal

JV petas ke la centro estonte sendu la revuon perletere al li.

La estraro laŭdas pri la nova *Horizontaal* la kovrilon, la plion de vario, la ilustraĵojn, la mankon de la iama *Vervolg zie blz....* ktp. ktp.

Pli malsukcesaj estas la grizaj traboj kaj la fakto ke ne ĉiam estas klare kie finiĝas artikolo kaj kie komenciĝas nova. Titoloj de titoloj kaj subtitoloj ne estu same grandaj.

La estraro insistas, ke nomoj de aŭtoroj aperu plenaj. Kiu estas la mistera kh kiu verkis la (tre bonan) artikolon pri Tyneverum?

Aŭdiĝas voĉoj ke *Horizontaal* ankaŭ traktu sociajn problemojn kiuj iel rilatas al lingvo.

La estraro ripetas, ke la malgrandaj amendoproponoj ne malpliigas ĝian laŭdon pro la atingita rezulto.

## 2.4 Kotizosistemo

ID antaŭmetis longan proponon pri ŝanĝo de la kotizosistemo. Post longa diskutado decidiĝas la jenaj du punktoj:

- En 1991 la centro sendos al la informpetintoj de la lastaj kvin jaroj la septembran-oktobran numeron de *Horizontaal* (tiun kun la novaj kursoj) kaj la novembran-decembran (tiun kun la listo de abon- kaj membriĝ-eblecoj), kune kun ĝirilo(j). PP kalkulos pri kiom da senpagaj ekzempleroj temos. La informpetintoj de la lastaj monatoj ricevos, kiel jam decidite, minimume tri sinsekvajn numerojn senpage.

- Ekde 1992 la grupoj de FEL ricevos malpli da mono por la enspezitaj kotizoj. Kompense ili ricevos monon por ĉiuj pruvitaj kaj anoncitaj aktivaĵoj kiaj kursoj, prelegoj ktp. Tio ĉi estos detale pridiskutata en la ĝenerala kunsido de marto.

## 2.5 Jarkunsido

La ĝenerala jarkunsido de FEL okazos en la centro la 23an de marto 1991 je la 15a horo. Inter la 13a kaj la 15a horo la domo estos malfermita por vizitantoj.

La jarkunsido traktos kiel kutime la administran kaj financan raportojn pri la antaŭa jaro, la elektojn de nova administrantaro, estraro kaj prezidanto.

La grupoj ne forgesu sendi la nomojn de siaj administrantoj por la jaro 1991 al la sekretario aŭ al la centro antaŭ la 15a de marto!

Post la elektoj okazos diskuto pri la nova subvenci-strukturo (vd. antaŭan punkton.)

## 2.6 Diversaĵoj

Honorigo de nia honora prezidanto Edward Symoens okazos en la komunuma domo de Kalmthout la 25an de majo.

Protokolis PP.